

FLANDRA STUDANTO

MONATA ALDONO AL
FLANDRA ESPERANTISTO

REDAKCIA ADRESO : PETER BENOITLAAN 95, GENTBRUGGE

PRI LINGVA UNUECO. — Unueco estas necesa por internacia lingvo ; estas do dezirinde ke ĈIUJ Esperantistoj sin detenu uzi vortojn kies radikoj ne estas akceptitaj de la Lingva Komitato. La nombro de la oficialaj radikoj kaj gramatikaj elementoj estas 4441 ; se oni konsideras ke per unu radiko oni povas fari kvanton da vortoj, la nombro 4441 aperas grandega.

Eble en la komuna lingvo mankas ankoraŭ kelkaj radikoj, sed, kompanse, inter la 1974 de la ses aldonoj al la Universala Vortaro de Zamenhof, multajn oni povas forlasi ; en sia broŝuro (1922). «Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto» Th. Cart montris radikojn «malpli dezirindajn ol la pli pure Esperantaj formoj» ; en la tri lastaj aldonoj, aperintaj post la broŝuro de Cart, oni trovas ankaŭ tiajn vortojn.

Radikvorto al kiu oni donas, en Esperanto, diversajn sencojn, estas malpli dezirinda ol vorto preciza, eĉ se tiu vorto estas laŭdirite «internacia» (en kiom da lingvoj oni trovas ĝui kun la SAMA senco ?) Precizeco estas ja pli necesa en internacia ol en ordinara lingvo ĉar ĝi devas servi por personoj kies kutimaj pensmanieroj estas malsamaj ; ni bezonas help-lingvon VERE mondan. Estas do tre konsilinde ke ĈIUJ Esperantistoj BONE konu la «Fundamento'n de Esperanto» kaj la oficialajn aldonojn al la U. V. ; la tri unuaj aldonoj estas en la broŝuro de Cart ; la KVARA (1929) estas presita kun traduko angla, franca, germana en la ĵarlibro de U. E. A. 1931 P. 61 - 64 ; la KVINA kaj SESA aldonoj kun klarigoj en Esperanto kaj tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj pola, aperis en «Esperanto», Aŭg.- Sept. 1935. La «Lingva Komitato» ne plu akceptos novajn radikojn antaŭ la jaro 1940.

C. V.

PRI LA VORTO «BIS» — «Bis» estas akceptita de la lingva komitato; ĝia signifo estas «re» «duan fojon»; flandre: nog eens; france: bis; angle: again; germane: noch einmal. Ĝi estas uzebla sen gramatika finiĝo, kiel la vortoj «ankoraŭ» «ve» kaj aliaj. La interjekcio «bis» bone efikas en teatro, en koncerto K. T. P.

La ciferoj montras la numerojn de la aldonoj al la U. V.

A - 4 abituriento, abstini, akselo, aktuala, akvaforto, albino, aleno, aloo, aluminio, amara, amoro, anilino, aŭtonomia. - 5 aviado - 6 angoro, aperturo, aplombo, arbusto (botan.), aŭguri, aŭreolo.

B - 4 bireto, bis, bombasto - 5 bremsa, bulteno - 6 balcto, bankiero.

CC - 4 ceramiko, ĉevrono (arĥitekt.)

D - 4 derivi (gram. transit.) diluvo, dimensio, doko

F - 4 fagoto, fikcio - 5 fono

E - 4 ekzakta, empirio, establi

G Ĝ - 4 genciano, genisto, grundo, ĝemelo - 6 gramofono, grego

HH - 4 hegemonio, helico, hipnoto, humo, - 6 honorario

I - 4 imuna (medic) inaŭguri, indekso, indigo, indiĝeno, inerta, inflamo (med.) intelekto, intensa, inundi, inversa - 6 ingredienco

K - 4 Kalio, kalva, karbono, kastanjeto, kinino, klaĉi, kloro, kluki, knari, koincidi, kolizii, komisiono, kondicionalo (gram.) konkeri, konsekri (relig.) kontinua, korolo, kreditoro, kvereli - 5 kabineto - 6 koncesio, konduktoro.

L - 4 lameno, lamenti, lato, latero (geom.) lenso, lobo, lordo, lumbriko.

M. - mis (prefik.) 4 - medolo, merkato, munti, murdi 6 - monotona.

N - 4 narkoti, naso, natrio.

O - 4 oksido, oleandro, orbito.

P - 4 panelo, paŝtelo, patricio, pedagogo, pedagogio, pelerino, pioĉo, pivoto, plago, plantago, plastiko, plebo, pluraj, pluralo, podio, provoki 5 - plagiato, pilo.

R - 4 redukti (sc.), regento, rezisti.

S - ŝ - 4 sacerdoto, sekura, skemo, solventa, spleno, stameno, stipendio, subvencio, ŝpato, - 5 slipo, - 6 strebi, susuri, ŝrumpi.

T - 4 Trafiko.

U - 4 uzuro.

V - 4 valida, varo, vizo, volumeno, - 6 vizio, vinkto, vivisekcio

Z - 4 zefiro.

Jen sekvas la lasta strofo de la «Preĝo sub la verda standardo». Pri ĝi oni povas legi en «Originala verkaro» jenan komenton. «Dro Zamenhof mem ne presigis ĝin en la «Krestomatio». Do ĝi hodiaŭ estas malmulte konata. Ĝi estas publikigita el «Tra la mondo» N.2 en «British Esperantist» II 1906 N. 14 pag. 18. Cetere ĝi ankaŭ troviĝis en «Deveno kaj Historio de Esperanto» N. 2, Praha, 1908, pag. 8 - 12 je la fino de la kongresa parolado en Boulogne-sur-Mer; sed tie Zamenhof ne citis ĝin, sed nur la strofojn 1 - 5.

Strofo 6. *Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,*

Antaŭen kun pacaj armiloj!

Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj

Ni ĉiuj de Di' estas filoj

Ni ĉiam memoru pri bon' de F homaro

Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro

Al frata celo ni iru obstine

Antaŭen, senfine.

I. VERTAAL IN ESPERANTO — 1 Alvorens de kamer te verlaten,

doof het licht uit. 2 Vader is ernstig ziek. 3 Wij zullen Esperanto getrouw blijven. 4 De kinderen zijn op straat aan 't spelen. 5 Eerlijke menschen handelen eerlijk. 6 Die arend vliegt hoog boven den hoogsten berg. 7 Wijze menschen spreken wijs. 8 Het kind scheen hem buitengewoon verstandig. 9 Werken is gezond. 10 Met zulke menschen als zij kan men niet rustig leven. 11 De kursus over «Eerste Hulp» begint morgen avond te 8 u. juist. 12 Samen met twee vrienden, bezocht ik het jaarlijksch kongres. 13 Onze groep vergadert iedere week. 14 Dagelijks sterven er honderden menschen. 15 De haas loopt snel maar de hazewind loopt sneller.

II VUL IN. — La reĝo Louis XVI iam veturis malrapid tra kampar-Kamparano estis sekvant-, kantant-, la reĝ- kaleŝ-. «Ĉia kantado plaĉas al mi» diris la reĝ-, «bis!». - «Kion tio signifas» demandis la kamparano? - Ti- signifas ke mi petas ke oni re- kantu. Kaj la kamparan- rekant- el la tut- gorg-. «Tre bon-, kaj la reĝ- donac- al la kant- nt- kelk- or- moner-. «Bis» tuj diris la ruzul-, antaŭenigant- sia- alimant-. Oni asertas ke la reĝ- ridis kaj... ree pagis.

VERBETERING Nr. 2 - OEF. IV — 1 Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. 2 Januaro estas la unua monato de la jaro, aprilo la kvara, novembro la dekunua, decembro la dekdua. 3 La birdo flugas en la ĉambro; ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi, sed jen, ĝi flugas eksteren, en la ĝardenon sur la grandan arbon. 4 La patrino de Johano povas nek legi nek skribi kaj tamen ŝi estas inteligenta. 5 La knabino legas ne mian libron sed la ĵurnalon de la patro (Ne legas... is een verkeerde vertaling. Het meisje leest wel maar niet mijn boek. Vader is gekend, dus bepaald: bep. lidwoord «La») 6 La kato sidas sur la benko antaŭ la fenestro. Ĝi saltas de sur la benko kaj eksidas sur seĝo. 7 Estis bela somervetero (somera vetero). La suno forte brilis kaj la ĉielo estis hele blua (klare blua). 8 Ili devis pagi ne 20 frankojn sed 26 frankojn por la libro, ĉar ĝi estis hindita. 9 Mi opinias (niet pensi. Pensi is denken, nadenken.) ke tiu ĉi ĉambro estas (ik dacht. De kamer is, estis dus in O. T. T.) pli granda, mi ne sciis ke ĝi estas tiom (niet tiel. Tiel duidt de manier aan. Tiom den graad.) malgranda, ĝi povas enhavi ne pli ol seson da personoj. 10 Ne mi sed mia fratino skribis tiun leteron. 11 Via avo estas la malplej maljuna (niet plej juna, want grootvader is niet jong, maar oud, doch is de jongste van de oudjes.) el ĉiuj maljunuloj en la maljunulejo. 12 Mia najbaro havas 5 infanojn: 2 knaboj kaj 3 knabinoj. La plej aĝa knabino estas kudristino kaj la malpli aĝa (pli juna) knabo estas 2 jara.

VERBETERING VAN OEF. V. — 1 Rajdante sur malgrasega ĉevalo, li vojaĝis tri tagojn. 2 Mi aĉetis tri metrojn de tiu ĉi ŝtofo. 3 Kiam la vintro finiĝos mi vojaĝos al Francujo (io - lando) 4 Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelkajn seĝetojn (kelke da seĝetoj). 5 Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj. 6 La lignisto vendas lignon kaj la lignajisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn. 7 Li sidas apud la tablo kaj dormetas. 8 Mi opinias ke malgraŭ la frostego, la geranio ankoraŭ estos floripova. 9 Antaŭ multaj jaroj vivis reĝo, kiu tiom ŝatis la novajn vestojn, ke li elspezis sian monon nur por esti bele vestita. 10 Mi lavas min en mia ĉambro kaj ŝi lavas sin en la sia. 11 El miaj du infanoj Karlo kantas pli bone. 12 Tiu domo ne estas enlogata. 13 Mi aĉetis nigrajn jakon kaj pantalonon. 14 Manginte (post kiam ni estis mangintaj), ni tuj eklaboris. 15 Vi parolas sensencujon, mia amiko.

Op zekeren dag trokken twee onschuldige uithangborden de aandacht van den voorbijgaanden jongen student : Svejcarskaja (pordistejo - pordo - ist - ej.) en konditorskaja (sukerajejo - sukero - ajo - ej.) Zijn gedachten concentreerden zich op dat woordje «skaja», dat in beide woorden de beteekenis heeft van plaats, bestemd voor of tot iets in verband met het grondwoord. En in een van die lumincuse, geheimdoorlichtende visioenen zag Zamenhof de dikke woordenboeken tot een minimum aantal bladzijden verminderen, den aan te leeren woordenschat wegsmelten als sneeuw voor de zon. Hij herinnerde zich namelijk hetzelfde verschijnsel in andere taler aangetroffen te hebben en met zijn aangeboren speur- en studiezin begon hij dat speciaal verschijnsel van achtervoegsels in alle hem bekende talen te onderzoeken, te vergelijken, tot een systeem uit te werken. Met een zeer beperkt aantal grondwoorden zou hij nu heele reeksen nieuwe woorden kunnen vormen, alleen met behulp van een paar van buiten te leeren achter- en voorvoegsels, met vaste, zelfstandige beteekenis. Daarmee was een groote moeilijkheid uit den weg, - de te uitgebreide woordenlijsten - . Er bleven echter nog die tallooze vormen van werkwoorden, met vaste regels en even zooveel vaste uitzonderingen, alles nuttelooze geheugenstof.

VERBETERING VAN OEF. VI. — Bijten - mordl, piki. Agent - agente, policisto, policano. Afvaardigen - deputi, delegi. Gulzig - mangegema, avida. Heelal - Kosmo, universo. Inwikkelen - envolvi, komplikiĝi, ĉirkaŭvoivi.

R E S P O N D O J D E L A R E D A K C I O

D. Fr. C. Blankenberghe. (Resume). Ĉu devas esti : 36 dividite aŭ dividita ? Ĉu la formoj : «Labori estas necese» kaj, «Hodiaŭ estas treege varme» estas korektaj ?

Diru : 36 dividita per 3 estas 12. (Tra la Labirinto, p. 215.)

36 estas dividebla per 3.

36 (la nombro 36) estas la subjekto, do : dividita, dividebla.

Alla taŭga esprimo : dividite per 3, 36 iĝas 12. Dividite = kiam 36 estas dividita. (Tra la Labirinto, p. 196.)

En la frazoj «Labori estas necese» - «Hodiaŭ estas treege varme» vi ne devas dubi pri la ĝusteco. «Necese» en la unua kaj «varme» en la dua frazo estas adverboj, do e.

Mi dankas vin pro la sinceraj gratuloj kaj pro la atentigo pri du preseraroj. Bonvolu pardoni al mi sed la priatentigitaj eraroj ne estas preseraroj almenaŭ unu ne. La eraro rilate la litero «U» mi jam korektigis en n° 2. La dua atentigo vere plaĉas al mi ĉar vi pravas. Efektive la vorto «adjutant», francdevena, ne taŭgas por servi kiel elparola ekzemplo en «FLANDRA Studento». Malgraŭ tio mi ne povas trovi alian pli taŭgan vorton, tial mi proponas elparoli la literon «Ĝ» kiel «DZJ».